

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner - Esperantisten im Bundesbahn - Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 4

augusto/septembro/oktobro 1990



Detruigis muroj, interpopolaj baroj en Mez-Eŭropo

D-RO ISTVÁN BÁCSKAI:

La jaro 1989, do la dua jaro de la dua jarcento de Esperanto alportis ĉiurilate surprizojn. Unu post la alia — parte, aŭ tute — oni detruis la teknikajn barilojn ĉe la landlimoj, kie disigis landpartojn, popolojn dum longaj jardekoj...

De jaro al jaro plifortiĝis la deziro de la popoloj trovi novajn eblecojn por kunlaborado inter la dividitaj landoj, popoloj, tiel, ke finfine ne plu estis eble malatenti ĝin.

La interesitaj popoloj mem iniciatis gravajn paŝojn ĝis nun neimageblajn!

La hungara registaro forigis la „ferkurtenon“ laŭlonge de la hungara-aŭstra landlimo. Post nelonge sekvis la ekzemplon Ĉeĥoslovakio ĉe sia aŭstra limregiono. Sekvis la trampono de la „berlina muro“, krome fariĝis konataj kaj historiaj okazintaĵoj en Sovetunio, Bulgario kaj fine en Rumanio.

La eventoj rezultis tute novan, multe pli liberan socipolitikan medion, kie ŝajnigas pli bonajn eblecojn ankaŭ por kulturaj kunagadoj, samtiel interalie ankaŭ por Esperanto. Ĉu ni povos utiligi ilin?

La fortiĝo de la nacia konscio certgrade malfavoras, sed post atingo de la plej necesa nivelo — kaj en la evoluo kaj en la socipolitikaj medioj — espereble tio ne plu bremsos la renaskiĝon de la por kaj per Esperanto-laboro.

La lastatempe alvenintaj informoj — ekzemple el Sovetunio, el orient-eŭropaj landoj, eĉ el Turkio — kuraĝigas nin, sed neniu povas esti kontenta! Fakte plifortiĝas la intereso rilate al Esperanto, samtiel kiel al ĉiuspeca alia bona ilo de interkomunikado, sed samtempe, eĉ pli grandmezure kreskis la pretendoj al ili!

Denove estus grave por Esperanto, ke ĝi pruvigu utila! Do, ni ne atendu la tutan normaligiĝon de la vivo en la koncernaj landoj, urĝe ni donu

helpon al la rekomenco de la instruado, realigo de la reciprokaj movadaj informŝanĝoj k.t.p. Sendube oni povas proponi krome ceterajn, eble pli konvenajn, pli trafajn metodojn, sed ĉikaze ni volas nur mobilizi kaj sugesti kelkajn eblecojn al komunaj fortostreĉoj celantaj la tre dezirindan akceladon de la urĝa aliĝo, realigo al la internacia movado.

Koregan dankon kaj gratulon al la ĝenerale „sennomaj“ entuziasmaj, oferemaj herooj, kuraĝaj ĉiutagaj hĥomoj pro ilia mirinde rezultohava kunagado, batalo,

Ne trotaksante la rolon de la enlanda kaj internacia kunagadoj de la esperantistaro, en la nuna situacio — ni opinias, tio estas utiligenda kontribuo — dezirindas ekkoni la necesajn kaj eblajn paŝojn de la kompetentuloj kiel eble la plej baldaŭ.

Kompreneble ni direktas nian atenton unuavice al nia najbara lando Rumanio, kaj al la baltaĵ regionoj, al tie funkciantaj Esperanto-organizaĵoj, respektive al tie vivantaj gesamideanoj.

Menciindas, ke utiligante nian malnovan adresaron, letere jam ni ofertis ĝeneralan helpon al ili, sed por ekzemplo nun ĉi tie ni publike deklaras kelkajn konkretajn, laŭdezire utiligeblajn ideojn:

En nia kvaronjara revuo Hungara Fervoĵista Mondo (HFM) ni disponigas laŭdeziran lokon por aperigi alvokojn, informojn, sciigojn ktp. rilatajn al Esperanto (senditajn al nia organo tiucele).

Ni sendos specimene ekzempleron de HFM (ĉefe por samfakuloj) eĉ eble ni povos transdoni kompletan jarkolekton (por klubo, landa organizaĵo), se la koncerna propono alvenos al ni ĝis la limdato la 30a de aprilo.

Niaj esperantistaj bibliotekoj en limigita kvanto pretas donaci librojn, periodaĵojn, diskojn kaj sonbendojn el duplikaĵoj, elektitajn surloke (ekzemple oni povos transpreni dum porokaza vizito).

Por interŝanĝi movadajn spertojn ni ebligas vizitojn precipe okaze de niaj regulaj Esperanto-programoj, aŭ krome (perletere interkonsente) en precize fiksita tempopunkto.

Niaj taskoj estas helpi la renaskiĝon de iamaj (aŭ novaj) Esperanto-organizaĵoj per korespondado, reciprokaj kontaktoj, realigi kaj plivastigi la interkontaktojn de la esperantistoj en tiuj regionoj, kie la por kaj per Esperanto-agado estis grave malhelpata, eĉ ofte malpermesata.

Kio finfine rezultas la pli frue apenaŭ espereblajn ŝanĝojn. Inter la kunagantoj certe estis kaj estas ankaŭ esperantistoj.

Tutkore, fiere ni salutas ilin ĉi tie, se ni ricevos iom detalan informon por dece rememori pri ili, tiucele ni disponos lokon en la kolumnoj de la periodaĵo Hungara Fervoĵista Mondo de la Hungara Sekcio de la Internacia Fervoĵista Esperanto Federacio.

El: Hungara Fervoĵista Mondo

Städtepartnerschaften mit Leben erfüllt:

Europa-Fest in Darmstadt

vom 24. bis 27. Mai

Für die Esperanto-Gruppe Darmstadt bedeuten Städtepartnerschaften mehr als händeschüttelnde Bürgermeister und Partnerschaftsschilder am Ortseingang. Die Darmstädter Esperantisten haben seit Jahren Kontakte zu allen sieben Partnerstädten Darmstadts. Ob im französischen Troyes, im türkischen Bursa oder im norwegischen Trondheim — überall gibt es eine Esperanto-Gruppe, und somit auch überall Menschen, die die Städtepartnerschaft mit Leben erfüllen. Denn erst wenn sich auch die Bürger der Partnerstädte kennenlernen und unterhalten können, erreicht die Partnerschaft ihr Ziel. Zum Europa-Fest nach Darmstadt kamen nicht nur Gäste aus den Partnerstädten, sondern auch aus Szeged in Ungarn. Zur Esperanto-Gruppe dort pflegen die Darmstädter Esperantisten nämlich auch enge Beziehungen.

Auf Regierungsebene noch Zukunftsmusik — die Esperanto-Verbände feiern schon Jubiläum:

10 Jahre deutsch-polnischer Jugendaustausch

In Bonn und Warschau knallen die Sektkorken: Am 26. Mai jährt sich zum zehnten Mal die Unterzeichnung des „Abkommens über den Austausch von Teilnehmern an Veranstaltungen der Deutschen Esperanto-Jugend (DEJ) und des Polnischen Studentischen Esperanto-Komitees (PSEK).

Franz Kruse für die DEJ und Krzysztof Sliwinski für PSEK unterzeichneten damals in der kleinen polnischen Stadt Pomiechówek den Vertrag. Seither nutzen einige hundert junge Esperantisten die Möglichkeit, das jeweilige Partnerland besser kennenzulernen, Vorurteile abzubauen und Freundschaften zu schließen.

Ob bei einer Skiwoche in den Karpaten oder einem Umwelt-Seminar in Marburg — für die Teilnehmer aus den Partnerländern ist immer gesorgt. Paß- und Visaformalitäten erledigen die Verbände; die Teilnehmer zahlen in ihrer jeweiligen Landeswährung einen bestimmten Betrag an den eigenen Verband, der damit die Kosten für den Aufenthalt eines Besuchers aus dem Partnerland decken kann. Je intensiver der Austausch von deutscher Seite genutzt wird, desto mehr Polinnen und Polen können die Veranstaltungen der DEJ besuchen, denn das „Personentage-Konto“ sollte immer ausgeglichen sein.

Um das Austausch-Programm noch weiter ausbauen zu können, fordern DEJ und PSEK seit langem die Errichtung eines deutsch-polnischen Jugendwerks durch die beiden Regierungen.

- eid-Redaktion: Thomas Bormann,
06 21 / 15 38 85 oder 06 21 / 4 10 41 77

Ek de Februaro 1990

la fervojistoj de Barcelono Hispanio havas novan sidejon:

en la vestiblo de la fervoja stacidomo CLOT-ARAGO

La klubaj kunvenoj okazas ĉiulunde de la 17a ĝis la 20a horo. Gastoj estas bonvenaj.

Koresponda adreso: Hispana Esperanto-Fervoĵista-Asocio (H.E.F.A.) Apartado 15027 E-08080 BARCELONA

Britio:

La Britaj Fervojoj (BR) enkondukis novan IC-vojaĝinterligon. Per tio unuafoje estas kreita rekta kunigo inter nordokcidento kaj sudoriento de Granda Britio kaj same tra la marhavenoj ĉe la Manika Kanalo al la kontinento. Enkadre de tiu servo (ĉiutage sep trajnoj en ambaŭ direktoj) estas priservataj la urboj Liverpool, Manchester, Dover, Newhaven, Brighton. La veturdaŭro estas malpliigata per pli rapida atingo de la finstacio, netuŝante Londonon. Por aŭtomobilistoj konstruiĝis aparte nova IC-stacio „Parkway“ en Kensington Olympia proksime de Londono.

Vojaĝo per Vulkan-Ekspreso

Ekzistas multaj etŝpuraj fervojoj en Germanio, kiuj ankaŭ trafikis. Unu el ili estas la privata Brohltal-fervojo, kies relvojo kondukas maldekstre de la Rejno al la Eifel-montaro.

Oni komencis veturi sur la linio en 1902; ĝi estas nomita en la horarlibro de la DB sub la numero 608.

La fervoja linio komenciĝas en Brohl (inter Koblenz kaj Bonn), kondukas tra la stacioj Bad Tönisstein kun la plej malgranda stacidomo en Germanio, Burgbrohl, Niederzissen, Oberzissen al la finstacio Engeln. La pasaĝertrajno nomiĝas „Vulkan-Ekspreso“.

La fervojlinio estas longa nur 17,5 km, la ŝpuro estas 1 m larĝa. La trajno superas dum la veturado tra kelkaj naturrezervejoj niveldiferencon de 400 m. La vojaĝtempo de pasaĝertrajno estas 80 ĝis 90 minutojn, do rapideco je 13 km/h.

Sed ĉi tiu rapideco vere valoras! La fervojlinio kondukas tra mezmontarpejaĝo kun multaj eblecoj por migrado, ekzemple al la Laachlago, la plej granda vulkanlago de la Eifel-montaro. Ek de la finstacio Engeln oni facile atingas per aŭtobuso Nürburg kun la famkonata aŭtodromo Nürburgring, la plej altan monton de la Eifel, la Hohe Acht (746 m) kaj belajn Eifel-vilaĝojn.

En la trajno oni povas kunpreni sian biciklon, kaj ek de la stacioj oni povas fari multajn belajn ekskursojn.

Vartrajnoj sur la fervojlinio transportas al la Rejn-haveno Brohl „Phonolith“ lavaŝtonojn, kiujn oni bezonas por produkti glasojn. La trajnoj nuntempe estas trakciataj per dizellokomotivoj.

Multaj vojaĝantoj jam kelkfoje veturis laŭlonge de la bela Rejnregiono, sed vere gajnas el veturo per la „Vulkan-Ekspreso“ de la Brohltal-fervojo en la bela regiono de la Eifel-montaro.

Informojn kaj prospekton vi povas ricevi ĉe:

Brohltal-Eisenbahn,
Postfach 68
D 5474 Brohl-Lützing.

Ĝis la revido en la „Vulkan-Ekspresso“!
EI DEFA-Bulteno.

Fortsetzungen

Stolz und Befriedigung waren wohl auch die vorherrschenden Gefühle bei den an der Feier anwesenden Esperantofreunden. Befriedigung darüber, daß die nach Esperantistenverfolgung und Bücherverbrennungen durch die Nazis erst nach dem Krieg wieder neu aufgebaute Bibliothek, die zunächst in München, später im Pfarrhaus in Bissingen/Teck untergebracht war, jetzt im Rahmen einer öffentlichen Bibliothek, der Stadtbibliothek Aalen, auch für die Öffentlichkeit und für wissenschaftliche Bearbeitung zugänglich ist. Im Namen der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im BSW überreichte Egon Kiefer die kürzlich erschienene Esperanto-Übersetzung des offiziellen Fachwörterbuchs (Lexique général des termes ferroviaires) der Internationalen Eisenbahn-Union (UIC).

Kiel funkcias „Pasporta Servo“? Gastiganto de Pasporta Servo (PS)

pretas senpage gastigi vojaĝantojn. Por pagi manĝaĵojn gastiganto tamen povas peti iom da mono. Ĉiu, kiu havas sian adreson en la PS ricevas senpagan ekzempleron de la listo. Gastiganto devas scii la Internacian Lingvon. Farigu gastiganto.

Gasto

devas ankaŭ scii la Internacian Lingvon por uzi la servon kaj esti membro de PS. Tio signifas, ke oni davas posedi propran ekzempleron de la listo. La gastigantoj havas siajn senpagajn listojn, sed se oni ne volas mem aperi en la listo, oni povas aĉeti ekzempleron. Legu pri tio ĉi-poste.

Loka peranto

peras gastigojn en sia loko kaj kontaktigas gastigantojn kun vojaĝantoj. La loka peranto eventuale eĉ scias adresojn de gastigantoj, kiuj ne aperas en la listo.

Landa organizanto

varbas gastigantojn en sia lando, informas pri PS kaj helpas al la Centra Respondeculo diversmaniere. Li aŭ ŝi eble organizas rondvojaĝojn kaj donas informojn al individuaj vojaĝemuloj. Kelkaj LO-oj ankaŭ vendas ekzemplerojn de PS. Adresojn de LO-oj vi trovos ĉe la respektivaj landoj en la listo.

Centra respondeculo

estas Bertil Wennergren (Svedio), kiu kompilas la liston de gastigantoj. Al li vi sendu viajn (re)aliĝojn kaj malaliĝojn. La centra respondeculo tamen ne vendas PS-n. Adreso: Pasporta Servo, Folkungagatan 126, S-116 30 Svedio.

Centra distribuanto

vendas kaj distribuas la listojn. Adreso: Christian Nietzsche, Wehrstr. 69, C3, 4200 Oberhausen 1.

Nekrologo

Post longa malsano mortis la 8an de aŭgusto 1990 nia fidela grupano

Hermann Feulner (nask. 9. 10. 23)

Lokaj grupanoj partoprenis la entombiĝan ceremonion. Feulner apartenis al la loka kaj fervojista grupo en Lichtenfels ek de 1982 kaj partoprenis preskaŭ ĉiujn IFEF-kongresojn kaj GEFA-jarkunvenojn. Li vere estis simpatia kaj aktiva grupano kaj ofte li prezentis diapozitivajn al ni dum la grupvesperoj. Al lia ŝatata edzino Anni Feulner, Mohnweg 1, 8620 Lichtenfels, ni kondolencas kaj deziras, ke ŝi trovu la necesan forton, vivi sen la kara edzo. Nia kamerado Hermann restas ĉiam en nia memoro.

GEFA

Essen

Rolf Terjun, Finkenschlag 68, 4100 Duisburg 26 bittet darum, den für ihn bestimmten Schriftwechsel an obige Anschrift zu richten, da eine Beförderung mit EDS an die bekannte Anschrift (s. Bulteneo 5/89, S. 8) nicht mehr möglich ist.

Esperanto und Tourismus

Der Beauftragte Constnt Borremans, Niedersachsenweg 9A, 2110 Buchholz, Tel. 041 87/475, hat eine Liste erstellt aus der die bisher bekanntesten Kataloge Prospekte, Broschüren, Bücher in Esperanto usw. ersichtlich sind und zum größtem Teil für Sie beschafft werden können.

Redaktfino por n-ro 5 estas la 10. 11. 90'

Popolfesto en Kolonjo por nova urbfervojo

En Kolonjo oni festis la 27an de Majo 1990 inaŭguron de urbfervojo (S-Bahn), kiu havas longecon da 7,3 km meze tra la urbo.

Post kvinjaraj konstruado la urbfervojo nun havas propran relvojn inter Köln-Nippes kaj Köln-Mülheim. La linio havas ses stacidomojn, du estas tute novkonstruitaj.

Pro tio oni devis plilarĝigi la Rejnfonton, kiu nun havas 6 trakojn, sur kiuj trafikas pli ol mil trajnoj po tago, dum somero kaj festtago pli ol 1200 trajnoj.

ESPERANTO-FERNKURSUS II

Kosten:
40,- DM
Postgiro 611 50-466
Dormund BLZ 440 100 46

Einzahlen = bestellen bei:

Joachim Schrapp
Schmittingheide 17d
4400 Münster

Sie erhalten:

- Lehrbuch
- Tonbandkassette
- 15 Lehrbriefe
- briefliche Betreuung
- Korrekturen
- Beratung

GEFA

KONVERSACIA
KURSO

*Viele Situationen
des täglichen Lebens
werden als
Gesprächsstoff behandelt.*

*Damit erlangen Sie
die Fähigkeit,
eine allgemeine
Unterhaltung
führen zu können.*

KONVERSACIA KURSO ist der Fernkursus

Anschluß an

»Esperanto, eine lebendige Sprache«

damit Sie leicht lernen,
Esperanto flüssig zu sprechen.

**ESPERANTO FLÜSSIG SPRECHEN ZU KÖNNEN,
IST EIN ERLEBNIS —**

GÖNNEN SIE SICH DIESEN ERFOLG!

Herausgeber/eldonisto: Germana Esperanta Fervojista Asocio. Schriftleitung /redakcio: Wilhelm Graß, 8620 Lichtenfels, Sachsenstr. 7, Druck/preso: Druckerei Jungfer, 3420 Herzberg am Harz